

INFORMA

BOLLETTINO D'INFORMAZIONE

BULTENO



Bolonja Esperanto Grupo
Gruppo Esperantista Bolognese
"Achille Tellini 1912"


Via Avesella 16 - 40121 Bologna
tel-fax: 051-6446675
gesperbo@iperbole.bologna.it
www.comune.bologna.it / iperbole / gesperbo
c.c.p. n°18231407

Jaro / Anno 63 – n.1
Marto / Marzo 2013

Redaktanto - redattore
Mario Amadei

45-a SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

Tradicie la lastan semajnon de februaro la Esperanto-movado festas la Semajnon de Internacia Amikeco (SIA). En 1968 la sveda s.ano Erik Carlen lanĉis la proponon, cele plifortigi tra la mondo la amikecajn kontaktojn inter esperantistoj el pluraj landoj kaj krei interligadojn kun aliaj medioj ekstere de la E-movado. Ekde tiam la Esperanto-grupo Tellini, same kiel ankaŭ de aliaj italaj grupoj, organizis SIA-ajn aranĝajn, renkontiĝojn, publikajn kunvenojn kaj interrilatojn, komunajn vespermanĝojn, pri internacia amikeco; tre interesa estis la reciproka interŝanĝado de salutmesaĝoj, salutkartoj, donacoj kun la eksterlandaj geamikoj.



Paco kaj amikeco trans limoj

AMIKECO

*En la silento de l' profunda memo
Sekrete nestas revaj korosentoj
Pri firma interhoma amikemo,
pri plena harmonio inter gentoj.*

*Ĝi revas mondon de trankvila vivo,
homan socion en epok' feliĉa:
etoso rava de la kolektivo
libera, nobla, je bonvolo riĉa.*

*Fratiĝa celo ĉe la fin' rezultos
el kuna iro laŭ justeca vojo.*

*Se la pacamon ni sincere kultos,
ni povos diri kun intima ĝojo:*

*"Sur tuta tero l' amikec' ekfloras;
jubilu ni, ĉar nova tag' aŭroras"*

Luigi Minnaja

Ĉi jare la 22an de februaro nia E-grupo kunlabore kun kultura urba organizaĵo, organizis posttagmezan publikan kunvenon ĉe Socia Centro. En la aranĝo, al kiu ni invitis iujajn eksterlandanojn loĝantajn en nia urbo por partopreni la renkontiĝon, oni prezentis programon de salutoj, legaĵoj kaj video-filmo pri internacia amikeco kaj patrino lingvo; regalado kaj gustumado de frandaĵoj en pluraj lingvoj etose konkludis la renkontiĝon.

TAGO DE LA PATRINA LINGVO

Ĉiujare la 21^a de februaro Unesko invitas festi la Tagon de la patrino lingvo, ĝi ofertas okazojn pri pluraj eblecoj por aranĝi ene de la E-grupoj aŭ ĉe publikaj urbo-kunvenejoj, per konferencoj aŭ informado je la loka gazetaro. Precipe por lanĉi mesaĝon "Esperanto ne volas anstataŭigi la aliajn lingvojn sed deziras protekti ĉiujn kaj esti uzata nur en la internaciaj medioj"

INTERNACIA VIRINA TAGO, ALVOKO EL HIROŜIMA

Estimataj, kaj karaj gesinjoroj en la mondo, Ni, la plenuma komitato de la Internacia Virina Tago de UN 2013 Hiroŝima, konsistas el 23 organizoj kaj la municipo Hiroŝima, salutas vin solidarece, kaj elkore alvokas al vi. En la 3-a de marto, 2013, por la Internacia Virina Tago de UN en la 8-a de marto, ni havos kunvenon por kunlaboro per aldono de saĝoj kaj fortoj, kaj por antaŭenpuŝi konstruon de la socio por komuna partopreno de geviroj.

Virinoj de la gubernio kaj de la urbo Hiroŝima organizas kunlaborojn por heredigo de la socio paca al sekvanta generacio. Nur en paco ni povas koncentri fortojn por antaŭenpuŝo de komuna partopreno de geviroj.

Post publikigo de la "Listo pri Egaleco inter Viro kaj Virino" de la Monda Ekonomia Forumo en oktobro, 2012, ni denove pripensis pri nuna situacio de la japanaj virinoj. Laŭ vidpunkto pri ŝanco de dungigo, salajro, edukiteco, sano, vivkondiĉo, partopreno en politiko, entute la japanaj virinoj lokiĝas 101-a pozicio en la listo!

Longe daŭras malprospera ekonomio aldone al la katastrofo kaj de naturo kaj de la atomcentralo, kiu aparte atakas gejunulojn kaj virinojn.

"Ni pripensu pri feliĉo de la virinoj" estas la ĉefa temo de la Tago, 2013, kaj ni lernas pri hodiaŭa situacio de virinaj vivo, malriĉeco, kaj ties influo al kresko de infanoj, en Hiroŝima, kaj en Japanio. Ni konsiliĝas pri niaj taskoj, kaj antaŭen puŝos komunan partoprenon de geviroj en la socio... Tutkore vin salutas,

S-ino YOSIDA Mariko, Prezidanto de la plenuma komitato.

BOLONJA ESPERANTO-GRUPO

"Achille Tellini 1912"

Sabaton la 16-an de marto,

**je la 12,30 komuna tagmanĝo ĉe nia klubejo,
je la h. 15,30 Jarkunveno, Ordinara Asembleo**

KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ

37^a INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO

Itala Esperantista Junularo tradicie organizas ĉiujare la Internacian Junularan Festivalon.

Dum la venontaj paskaj tagoj, 27/03-02/04/2013, la festivalo disvolviĝos en la ĉarma suditala urbo Ostuni, en la provinco de Brindisi; tie kunvenos centoj da gejunuloj el la tuta mondo.

En internacia amika etoso dum unu semajno oni ĝuos agrablajn tagojn ĉe la maro kaj suno kaj nokta vivo; eblas partopreni la interesan riĉan programon pri kulturaj junularaj problemoj, labor-grupoj, konferencoj, koncertoj, ekskursoj. Tema, distra, vespera kaj ekskursiva programo kaj aliaĵoj organizatadas por la programo de la Festivalo, kaj estos iom post iom publikigitaj.

La pritraktata temo estos: "Pli ol 125 jaroj pasis ekde kiam Ludoviko Zamenhof eldoniĝis la Unuan libron, kaj plu Esperanto ne sole ne intas, sed certe ankaŭ ne ontas atingi sian mondan celon. Kial? Kaj kial kaj ĉu tio male estu?".

La festivalejo estos Villa della Speranza, en Ostuni. La konstruaĵo, nun administrata de la fondaĵo Madonna Pellegrina (Pilgrimanta Dipatrino), estas for de la maro nur kilometron, kaj 4 kilometrojn for de la trajn-stacidomo. La Vilaĵo de la Espero enhavas naĝejon, piedpilkampon, du grandajn manĝejojn, konferencsalonon kaj aliajn ĉambrojn por kunvenoj kaj renkontiĝoj, aldone al 120 litlokojn distribuitaj en 26 ĉambroj sur 3 etaĝoj. La litoj en la ĉambroj estos inter 2 kaj 8 kaj la ĉambroj havos sian propran banĉambron.

Fabio Bettani

Informoj kaj aliĝiloj > iej.esperanto.it/ijf <

oooooooooooooooooooo

INVITO AL LA 125-a JARA JUBILEO DE NURENBERGA ESPERANTO-GRUPO.

La Nurenberga Esperanto-grupo estas la plej malnova de la mondo. En 2013 oni festas la 125-an jubileon, kaj lige kun la festo la 90^a Germana Esperanto-kongreso okazos la 17-20-an de majo. Verŝajne vi ne scias, ke en Nurenbergo fondiĝis la unua Esperanto-grupo kaj eldoniĝis la unua gazeto en nia lingvo.

Sed Nurenbergo pioniris pli vaste: ĉi tie kreigis la unua globuso, veturis la unua germana lokomotivo kaj konstruiĝis la unua pendponto de Eŭropo. El Nurenbergo devenas la klarreto, la MP3-ludilo, la papera naztuko, la fluoreska markilo, la bombono emeukal...

Dum la Germana Esperanto-kongreso okazos prelegoj: pri la temo "Pioniroj kaj vizioj" kaj multaj aliaj temoj.

La programo estas tre riĉa kaj enhavas, krom jubileajn kaj kongresajn aranĝojn, viziton al la urbaj monumentoj, muzeoj kaj interesaj ekskursoj.

Oni planas pretigi ekspozicion pri Esperanto ĝenerale kaj speciale pri la grupo. Parto de tiu ekspozicio estos mondmapo ĉirkaŭata de gratulaj mesaĝoj el kiom eble plej multaj lokoj/landoj.

La ideo estas ligi ĉiun mesaĝon per fadeno al la loko sur la mapo, de kie ĝi venas. Ankaŭ plaĉus al ni, se la mesaĝo estus ne nur en Esperanto, sed dulingva, ĉar multaj homoj interesiĝas pri fremdaj lingvoj.

Samideanajn salutojn, Sabine Hüge

www.esperanto.de/jubileo

La centjara Bolonja E-grupo "A. Tellini 1912" jam sendis mesaĝon kun salutojn kaj gratulojn al pli malnova amika Nurenberga E-grupo.

Ni intencas organizi vojaĝon por partopreni la Jubilean feston, kiel jam okazis en 1988 (dum la Centa jubileo, kaj dek jaroj poste.

Mario Amadei

oooooooooooooooooooo

In occasione della ricorrenza del 125° anniversario di fondazione del Gruppo Esperantista di Norimberga e del 90° Congresso tedesco di Esperanto (17-20 maggio, periodo di Pentecoste), è mia intenzione organizzare un viaggio GEB in comitiva per partecipare all'importante manifestazione; stiamo vagliando le varie possibilità di viaggio e permanenza nella antica e bella città, ricca di monumenti, musei, palazzi. Invitiamo gli interessati alla proposta di contattarmi. Mario Amadei, tel 051 644 6675.

amadeimario@iperbole.bologna.it

oooooooooooooooooooo

80-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

Meze de la Marbordo de la Floroj, inter urboj *Imperia* kaj *Ventimilia*, proksime de famkonata urbo *Sanremo*, situas vilaĝoj *Taggia*, *Arma kaj Kastelaro*, en la antikva historia urbeto *Kastelaro* disvolviĝas la ĉi-jaran nacian Esperanto-kongreson, 03-10. 08.2013.



La kongresa programo, kies temo estas "Sin kompreni por sin respekti", enhavas plurajn kaj interesajn erojn: la seminariojn, kursojn, prelegojn, gvidataj de internaciaj spertuloj, estas la programero kiu de ses jaroj karakterizas la italiajn kongresojn. En la programo la koncerto en Esperanto estas konstanta ĉi-vespera programero; ne povas manki filmoj kaj teatraĵoj, en Esperanto-lingvaj originalaj dramoj fare de spertaj teatraj trupoj; la ekskursoj por viziti la urbon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, la urbo Sanremo fame konata pro la kazino kaj pro la Kanzon-

festivalo kaj tradicia feria loko.

Malkovrita de du jarcentoj de britoj, inter kiuj estas memorinda Clarence Bicknell, pioniro de Esperanto en Italujo, kiu en la proksima Bordighiera fondis muzeon pri botaniko kaj arĥeologio, kiun la kongreso vizitos.

Pluraj eksterlandanoj ŝatas partopreni la nacian E-kongreson, do ankaŭ ĉi-jare same kiel okazis dum la lastaj jaroj, oni antaŭvidas multnombrajn partoprenantojn, igante ĝin ne nur nacia sed vere internacia kongreso.

<http://kongreso.esperanto.it>

ESPERANTO EN LA ANARKIA KLUBO

Vendrede, la 1-an de februaro 2013, la bolonja Anarkia Klubo "Berneri" (<http://circoloberneri.indivia.net/>) okazis interesan prelegon pri la ligoj inter Esperanto kaj anarkiismo. La reta anonco pri la prelego atingis bolonjajn esperantistojn, multaj el kiuj decidis partopreni la arangon.

La prelego okazis en la anarkia klubejo, ĉe la urba pordo Sankta Stefano (itale: Porta Santo Stefano).

Prelegis Viktor Bosnjak, vojaĝema junulo kaj plurlingvulo (post la prelego li rakontis, ke li reĝas 8 lingvojn!). Viktor naskiĝis en Austrio, en kroata familio forfuĝinta el la jama Jugoslavio (en la nuna teritorio de Bosnio kaj Hercegovino), kaj nuntempe loĝas en Bolonjo dum mallonga tempo.

La prelego entute daŭris unu horon kaj duono, kaj disvolvigis en tri cefaj branĉoj:

- (1) la historio de Esperanto;
- (2) la gramatiko de Esperanto;
- (3) ligoj inter Esperanto kaj anarkiismo.

La enhavo estis tre detale pritraktita de Viktor, kiu ne improvizis la rakonton, sed laŭtlegis mem-preparitan tekston, ĉefe pro tio, ke li ne denaske regas la italan lingvon. La legadon akompanis surekrane projekciitaj bildoj.

La gramatika parto estis pritraktita en granda detalo, kio vekis iom da konfuzo inter la neesperantistaj ĉeestantoj. Oni eĉ montris la tutan korelativan tabelon kaj zorge listigis ĉiujn eblajn uzojn de la akuzativo!

Nome de la Bolonja Esperanto-Grupo, la sekretario Mario Amadei salutis la ĉeestantojn, bonvenigante ĉiujn al nia sidejo kaj memorigante pri la malfermohoroj.

La ĉeestantoj ankaŭ ricevis informon pri la ebleco komenci Esperanto-kurson en GEB

La prelegon sekvis diskutrodo, kie la restantaj bolonjaj esperantistoj - Alla, Fabrizio, Fabio, Michela kaj Pierfrancesco - aktive partoprenis la diskuton kun la klubanoj.

La ĉefaj pritraktataj temoj estis la rolo de la angla kiel nuntempa pontlingvo (malgraŭ ĝia etneco), la kioma facileco de Esperanto, kaj la iugrada eŭropocentreco de nia verdstela lingvo.

Fine de la diskuto, esperantistoj forlasis la ejon, dum klubanoj ekigis komunan vespermangon. Kompreneble, retadresoj estis interŝanĝitaj, por ke kontaktoj povu plu daŭri kaj oni eble organizu kurson de Esperanto ĉe la anarkia klubejo.

En la estonteco, Viktor Bosnjak planas rondiri la anarkiajn klubojn kaj sociajn centrojn tra Italio por daŭrigi sian informadon pri la ligoj inter Esperanto kaj anarkiismo.

oooooooooooo

Venerdì 1° febbraio 2013, il Circolo Anarchico "Berneri" di Bologna (con sede in Piazza di Porta Santo Stefano) è stato teatro di una conferenza sul tema "Esperanto e Anarchismo". La notizia dell'incontro ha raggiunto, via Internet, gli esperantisti bolognesi, che hanno presenziato in massa.

La presentazione è stata curata da Viktor Bosnjak, nato in Austria da una famiglia di etnia croata originaria dell'ex Jugoslavia (attuale Bosnia ed Erzegovina).

I temi trattati sono stati la storia dell'esperanto, la grammatica dell'esperanto e i collegamenti tra esperanto e anarchismo.

Gli esperantisti hanno partecipato attivamente alla discussione che ha seguito la conferenza, rispondendo ai dubbi dei presenti e contribuendo alla riflessione comune sull'argomento.

A nome del Gruppo Esperantista Bolognese, il segretario Mario Amadei ha salutato i presenti, invitando tutti nella nostra sede e ricordandone gli orari di apertura. È inoltre stata menzionata la possibilità di iniziare un corso di esperanto presso il GEB.

Al termine dell'incontro, Viktor ha annotato gli indirizzi di posta elettronica di alcuni soci del gruppo, così da mantenere i rapporti e valutare insieme la possibilità di un corso di esperanto presso il circolo.

Fabio Bettani

NOTIZIE DA PARMA

Consegnato il premio di laurea "Giorgio Canuto"

Lunedì 10 dicembre, presso l'Università di Parma è stato consegnato il premio di laurea "Giorgio Canuto" alla neodottoressa Anna Rondelli, vincitrice della terza edizione del Premio Canuto. La tesi di laurea premiata aveva come titolo "Baha'i ed Esperanto. Alla ricerca della lingua universale".

In quest'occasione un folto pubblico giovane e meno giovane ha potuto ascoltare anche la prolusione sul tema "Lingue e Diritti degli esseri umani" di Giuseppe Gaetano Castorina, professore presso l'Università "La Sapienza" di Roma. Ha introdotto e moderato il professor Davide Astori nell'Università di Parma.

L'evento è stato realizzato grazie al contributo della Federazione Esperantista Italiana

oooooooooooo

All'Università Popolare si parlerà di Esperanto.

Corso: INTRODUZIONE ALL'ESPERANTO.

Insegnante: Prof. Davide Astori

Durata 10 lezioni.

Letture guidate e commentate su:

1. Introduzione all'Esperanto (La Unua Libro)
2. Il Discorso del Primo Congresso Universale (la fondazione etica)
3. La "Preghiera sotto il verde stendardo" e altre poesie di Zamenhof
4. La definizione di 'esperantista'
- 5-6. Alcune poesie in lingua originale (presentazione "poetica" del movimento esperantista)
7. Il Manifesto di Praga (la visione contemporanea sul diritto e la tutela delle minoranze linguistico-culturali)
8. Testi politici (Sugli Stati Uniti d'Europa e sul Tribunale internazionale)
- 9-10. I Dogmi dello Homaranismo (la visione di religione laica di Zamenhof)

Ogni incontro si divide in due parti: una prima mezz'ora di informazione linguistica (per raggiungere una competenza passiva di lettura di un testo scritto), un'ora di lettura e discussione di materiali (in lingua originale e traduzione). **Inizio, venerdì ore 18.00 dal 25 Gennaio 2013, proseguirà svolgerà nelle seguenti giornate: 25/01, 01/02, 08/02, 22/02, 01/03, 08/03, 22/03, 29/03, 05/04, 12/04.**

Università Popolare di Parma
Borgo S. Giuseppe, 13 - 43100 Parma
tel. 0521 236537
e-mail info@universitapopolare.pr.it
www.universitapopolare.pr

VIVO DE LA GRUPO ☆ VITA DEL GEB

NIAJ SEMAJNAJ RENKONTIĜOJ - I NOSTRI INCONTRI SETTIMANALI

Regulaj kunvenoj ĉiu merkrede kaj sabate - h. 16,30 - 19

Gli appuntamenti di ogni mercoledì e sabato. Tel. 333 427 992

I NOSTRI PASSATI INCONTRI

Il 125° anniversario della lingua Esperanto è stato celebrato il 14 dicembre 2012 nel programma della Zamenof-festo con un partecipato incontro pubblico presso il Centro Sociale "2 Agosto 1980" in cui Davide Amadei ha presentato un filmato sul Centenario del Gruppo; di seguito Daniele Agostini ha svolto un breve intervento sul legame tra cultura e Esperanto a cento anni dall'istituzione.

Dopo la pausa delle feste natalizie e di inizio d'anno, sono ripresi il 12 gennaio gli appuntamenti in sede del sabato pomeriggio con il tradizionale incontro della "Verda ŝtrumpo"; abbiamo organizzato un particolare pranzo preparato con gustose portate curate dalle esperte nostre socie, molto gradito dai partecipanti. E' seguita l'estrazione della lotteria con numerosi premi offerti dai soci, i vincitori sono stati molto soddisfatti della consistenza dei premi ricevuti, in particolare Giuseppe D'Avolio (con oltre 50 biglietti acquistati). E' stato un buon inizio d'anno che ha recato alla cassa del gruppo un ottimo sostegno finanziario. Sabato 19, la sede è stata messa a disposizione per la riunione del Consiglio Nazionale FEI, preferita per la posizione geografica e per l'accoglienza (soprattutto per la pausa pranzo organizzata da Gianna). Nella riunione sono state trattati i problemi organizzativi e assegnati ai consiglieri gli impegni per il programma annuale. Nella ricorrenza della 45a Settimana dell'Amicizia Internazionale e la Giornata Mondiale della Lingua Madre, patrocinata dall'UNESCO, abbiamo organizzato in collaborazione con l'Associazione Porto-Saragozza Amici della "Primo Levi", venerdì 22 febbraio, un incontro pubblico presso il Centro Sociale "2 Agosto 1980" (via Turati 98). E' stato programmato un video sul tema Amicizia internazionale e Pluralismo linguistico, presenti alcuni amici stranieri abitanti a Bologna. Un rinfresco, con squisite degustazioni "in varie lingue", ha concluso l'incontro con buon esito, nonostante la giornata di una forte perturbazione nevosa.

I PROSSIMI INCONTRI

Dopo la sospensione nei mesi scorsi, dal 6 marzo riprendono gli incontri del mercoledì pomeriggio con il *Paroliga kurso* e il servizio di biblioteca e archivio, mentre sono così programmati gli incontri del sabato:

- 2 mar. **El Esperanto-gazetaro.** Rassegna mensile della stampa esperantista.
- 9 mar. **Internacia Virina Festo.** Festa in onore delle socie ed amiche del GEB.
- 16 mar. **Je la horo 12,30 komuna tagmanĝo en nia klubejo; je la 15.30 Jara asembleo.** Alle ore 12,30 pranzo in sede, alle ore 15,30 Assemblea annuale dei soci.
- 23 mar. **Invito al 125^a E-Jubileo en Nurenbergo.** Proposta per il viaggio e partecipazione al 125° anniversario di fondazione del Gruppo di Norinberga, (vedi a pag.3).

- 30 mar. **Bonan kaj plenĝojan Paskon: la sidejo estas fermita.** Per le feste pasquali la sede resta chiusa
- 6 apr. **El Esperanto-gazetaro.** Rassegna mensile della stampa esperantista.
- 13 apr. **Trarigardo en nia historia arkivo.** Uno sguardo nel nostro archivio storico.
Jules Verne kaj Esperanto. Ricordiamo il grande scrittore francese che nel 1903 divenne esperantista (vedi a pag.6)).
- 20 apr. **Pri Blindula Esperanto-Movado.** Il movimento esperantista tra i nonvedenti.
- 27 apr. **Pri Blindula Esperanto-Movado.** Il movimento esperantista tra i nonvedenti.
- 4 mag. **El Esperanto-gazetaro.** Rassegna mensile della stampa esperantista.
- 11 mag. **Itala E-Federacio konsilantara kunsido.** Riunione del Consiglio Nazionale FEI.
- 18 mag. **Pri la 80a Itala E-kongreso.** Notizie sul congresso di Castellaro – Sanremo.
- 25 mag. **En nia biblioteko "Ridu per Esperanto", de Tibor Sekelj.** Nella nostra biblioteca abbiamo trovato un divertente libro

IL CENTENARIO

Il 2012 è stato l'anno del Centenario del Gruppo. Il nostro impegno è stato speso in gran parte per la manifestazione celebrativa di tale evento, che tuttavia non è stata l'unica iniziativa a cui abbiamo partecipato o che abbiamo promosso. Il 26, 27 e 28 ottobre le celebrazioni si sono articolate in una mostra, una manifestazione pubblica e una giornata a Riolutato. La partecipazione è stata soddisfacente per la presenza di numerosi soci, amici e rappresentanti dei gruppi esperantisti di varie città. I giornali hanno dato informazione sulle nostre tre giornate, che si sono svolte nell'ambito della Festa internazionale della Storia organizzata dall'Università di Bologna e hanno avuto il patrocinio della Regione, della Provincia e del Comune.



A ricordo del Centenario, un collage di foto dei partecipanti

DA DIECI ANNI IN VIA AVESELLA

di Giuseppe Trenti

Non si sono ancora spenti gli echi del nostro centenario, che già un'altra ricorrenza si sta avvicinando; di cosa si tratta?

Il primo aprile viene collegato al pesce d'aprile; noi, quel giorno di 10 anni fa lo ricordiamo per essere entrati fisicamente nella nostra sede.

La nostra sede! Un sogno che si realizzava. Quante volte ne abbiamo parlato in quei locali angusti di via Miramonte! Il ricordo va proprio lì, in quelle due stanzette riscaldate da una stufetta che esalava una costante puzza di cherosene. "E il bagno?" "Non c'era"; "E allora come si faceva?" "Si arrivava al bar vicino. Poi prima di uscire ci si fermava per un caffè o un bicchiere di vino, fra le volute di fumo, le imprecazioni di chi giocava a carte, e la barista che ci metteva del suo."

Ma come siamo arrivati ad avere una sede? La maggior parte di quelli che leggeranno queste righe, conoscono già tutta la storia che riassumerò per sommi capi per chi non la sa.

Gustavo Voltolini riminese, nipote di Achille Tellini, una volta partecipando ad un nostro incontro, ci parlò di una donazione a nostro favore; in effetti ci lasciò eredi (della nuda proprietà del suo appartamento occupato dalla moglie).

Dalla prima telefonata fattami da uno sconosciuto commercialista di Rimini, a quel primo aprile passarono più di 3 anni. In quanto Presidente del Gruppo fiancheggiato da alcuni eroi, ho seguito tutto il complesso iter burocratico con la Regione. Ho tenuto i difficili rapporti con il commercialista della vedova Voltolini che ci faceva sempre delle difficoltà; per non parlare di lei, della Signora che non ci voleva far vedere la casa. Come facemmo? Ci entrammo in nome della legge cioè con l'avvocato.

Poi grazie alla Legge Bassanini sulle semplificazioni, tutto si sbloccò dal punto di vista amministrativo. Noi come gruppo ci dotammo di uno statuto, diventammo una Associazione così potemmo accedere all'eredità.

Poi ci fu il momento della vendita. Trovammo un compratore col quale dopo un tira e molla al limite della farsa, concludemmo la vendita e così comprammo la sede.

Non si può dire che non sia stata una cosa sofferta; e se è vero che una cosa per essere bella deve essere anche un po' sofferta, allora questa è stata bellissima.

Se i locali di via Miramonte erano poco visibili, la sede del decennale si affaccia su una strada abbastanza trafficata via Avesella. Questo vuol dire che intorno a noi si è destato un certo interesse e curiosità. Tutto questo fa brodo si potrebbe dire; poiché è da queste attenzioni che siamo partiti per diffondere la conoscenza dell'Esperanto alla città.

A questo punto facciamo gli onori di casa a chi ancora non la conosce.

All'inizio era un negozio; così alzata la saracinesca una porta ci immette in quella che chiameremo sala di accoglienza e di riunione; a seguire la biblioteca ricca di volumi che vanno dalle grammatiche alla summa della esperantologia e che ricerche di archivio la stanno rendendo sempre più interessante. Un angolo cucina ci consente di organizzare dei momenti conviviali. Sì! C'è anche il bagno!

È accogliente la nostra sede. Venitela a vedere! Lo possono testimoniare i componenti del Consiglio della FEI che hanno scelto Bologna quasi come sede definitiva dei loro incontri non solo per una questione logistica, ma per le comodità che essa offre; grazie soprattutto a Mario e Gianna perfetti anfitrioni.

Peccato che tanti Sanideani che speravano che questo desiderio si realizzasse, non siano più con noi.

La visita è finita; esco dalla casa e su quei primi dieci anni abbasso la saracinesca.



1 aprile 2003, inaugurazione della nuova sede in via Avesella 16



"Aiutateci ad aiutare l'Esperanto"

E' lo slogan che la FEI invita i soci ed amici

di destinare il 5X1000 alla

Federazione Esperantista Italiana

Cod. Fisc. 80095770014

Successivamente la FEI assegna ai gruppi esperantisti italiani finanziamenti richieste dai gruppi per proposte e attività rivolte al pubblico esterno.

HISTORIAJ ESPERANTO -POŝTKARTOJ

Mi posedas chirkaŭ tridek poŝtkartojn pri la temo Esperanto. Ili estas datitaj ek de 1940 ĝis 1970 jaro kaj bone konservitaj. Mi deziras ilin vendi, ankaŭ unuope.

Petu iliajn skanojn, sen iu ajn sindevigo. Mi volonte sendos ilin.

Pinuccia Bevanda

CADORAGO (Como) Italio

bevanda.l@virgilio.it

telefono 338 391 1234

Jules Verne

“Esperanto estas simpla, fleksebla, harmonia lingvo, kiu taŭgas same por eleganta prozo kiel por harmoniaj versoj. Ĝi kapablas esprimi ĉiujn pensojn kaj eĉ la plej fajnajn sentojn de la animo... Ĝi estas la ideala internacia lingvo”.

Ĉu citaĵo el propaganda broŝuro pionir-epoka? Ne: temas pri frazoj el la lasta romano de franca verkisto-fantaziulo, kies revoj, kvankam ili plejparte jam plenumiĝis, ĉiam plu revigas la homojn: Jules Verne [pron. ĵil vern, 1828-1905].

La esperantisteco de Verne estas bone konata almenaŭ ekde 1977, kiam Marcel Delcourt kaj Jean Amoureux artikolis pri “Jules Verne kaj la internacia lingvo” en la revuo *Franca Esperantisto* (nov.-dec., p. 88). Dank’ al ili ni scias ke:

Verne bone konis la internacilingvan demandon, ĉar li amikis kun fervora volapukisto, deputito Raoul Duval. Kiam propaganda prelego de la E-pioniro Théophile Cart komence de 1903 instigis fondon de Esperanto-klubo en Amiens, la urbo kie Verne vivis, la verkisto tuj akceptis fariĝi ties honora prezidanto, je la peto de la klubestro Charles Tassencourt (negocisto, konsula agento de Usono kaj amiko de Verne) kaj de Joseph Delfour. *Tutmonda Jarlibro Esperantista* de la eldonejo Hachette baldaŭ enlistigis la adreson de la verkisto.

Verne promesis al siaj amikoj Tassencourt kaj Delfour dediĉi romanon al la meritoj de Esperanto. Li eĉ komencis ĝin sub la labortitolo *Voyage d'études* (Esplorvojaĝo), kaj roligis en ĝi certan Nicolas Vanof, pasian esperantiston. Sed la 24an de marto 1905 (kvar monatojn antaŭ la Bulonja kongreso) Jules Verne mortis. La filo Michel ankoraŭ eldonigis dekon da romanoj sub la patra nomo, el kiuj plurajn li mem verkis, uzante nur ideojn kaj motivojn el la postlasitaj manuskriptoj. Tia sorto trafis ankaŭ *Esplorvojaĝon*, kiu inspiris *L'étonnante aventure de la mission Barsac* (La stranga aventuro de la misio Barsac, 1914), romanon sen aludo al Esperanto.

Ĉu ni iam ekscios kion do Jules Verne verkis pri la internacia lingvo? Tion ni povis ekespero kiam la Pariza eldonejo *Le Cherche Midi* lanĉis sian kritikan eldonserion de Verne-aj manuskriptoj. En aprilo 1993 aperis ĉe tiu eldonejo la kolekto *San Carlos et autres récits inédits*



mits (San Carlos kaj aliaj rakontoj unuafoje aperantaj): kvar noveloj kaj du roman-komencoj. La volumo enhavas tiujn 50 paĝojn da *Esplorvojaĝo* kiuj ja estis verkitaj!

Ni povas nur provi diveni (same kiel Michel Verne per sia *Misio Barsac*) kiel la aŭtoro estus elvolvinta la intrigon. (“Ĝi estas la lasta verko pri kiu mia patro laboris”. — skribis Michel al la eldonisto.) La tempo de Jules Verne sufiĉis nur por kanvasi la romanon. Ni legas pri ekspedicio alvenanta al la kolonio Franca Kongo por determini ĉu ĝiaj loĝantoj estas “politike maturaj” por mem elekti deputitojn en la metropolan parlamenton. Sed apenaŭ ekmarŝas la ekspedicio, la romano interrompiĝas.

Afrika interlingvo

Estas tamen certe ke Esperanto kerne rolus en *Esplorvojaĝo*: ĝia heroo André Deltour lernas la lingvon, kiu estas prezentata kiel graviĝanta interlingvo en Centra Afriko. Evidente, nur la du prisatirataj figuroj, parlamentanoj Isidore Papeleu kaj Joseph Denisart, ne kapablas nek volas lerni ĝin: ili sole celas ĝui ekzotan vojaĝon ŝtatopage.

La propagando kiun Verne enbuŝigas al Nicolas Vanof, hodiaŭ sonas amuze amatora kaj eksmoda. Ataki Volapukon, juĝi la internaciecon de Esperanto laŭ latinida mezurilo, aprezi ĝin kiel “la plej rapidan vehiklon de la civilizacio” (evidente, blankula) — jen kio klare situigas la tekston en ĝia epoko. Sed ke konganoj komunikigu pere de Esperanto, kaj ne per la franca — tio eĉ hodiaŭ sonas revolucia ideo...

(Laŭ Ertl I. *Eksterordinara vojaĝo al Esperanto // Esperanto*, 1993, №11, p. 182.)

Esplorvojaĝo estis eldonita en Esperanta traduko de István Ertl kiel speciala literatura numero de la revuo *Franca Esperantisto* en aprilo 1994. La teksto spertis strangan sorton: “Esperanto” Radikala Asocio el Italio reeldonis ĝin pirate en trilingva volumo, franca-Esperanta-itala. Anstataŭ peti la rajton uzi la tradukon, ERA retajpigitis ĝin kun preseraroj, kaj eĉ neis sian ŝtelon.

La kataluna verkisto Abel Montagut montriĝis tute fascinita de Jules Verne kaj specife de *Esplorvojaĝo*. Unue, en 2003 li publikigis katalunlingvan romanon *El Manuscrit de Jules Verne*, kiu ekscite miksis la temon de nekonata kaj trovata Verne-manuskripto kun subtemoj esperant(ism)aj. Poste, en 2008-2009 li dokte kaj konvinke eseis (en *Libera Folio* kaj *Beletra Almanako*) pri la demando kial Verne interrompis la verkadon de tiu promesita romano Esperanto-rilata jam ĉe la kvina ĉapitro, kaj kial li neniam revenis al ĝi. La kialo estas tute ne tiu banala kiun oni imagus, nome ke en 1903, la jaro de la ekverko, la aŭtoro estis jam tro malsana, mortonta du jarojn poste.

Ne, temas pri io alia, io pli ide-rilata. Nome, Jules Verne celis pentri en *Esplorvojaĝo* afrikan landon kie regas relativa respekto inter blankaj koloniatoj kaj lokaj kolonioj, specife lingve, ĉar la komunikada lingvo tie iĝas pli kaj pli Esperanto. Sed ĝuste kiam Verne estis intense okupiĝanta pri la verko, en aŭgusto 1903 ĉiuj ĵurnaloj frontpaĝe diskriis la hororaĵojn okazantajn en Kongo, privata posedaĵo de la belga reĝo Leopoldo. Verne, kiu estis tre sentema pri la versimileco historia kaj geografia de siaj verkoj, vidis sin devigata reformuli la tutan projekton. Fakte, li poste skize preparis novan, pli vastan planon kun la labortitolo *Sahara urbo*, sed ankaŭ tiu plano restis stumpa.

Nia nelacigebla Montagut ne facile liberiĝis de la temo. En 2009 li eldonis, sub la nomo “M. Jules Verne” (M. = Michel? Monsieur? Montagut?), francilingvan verkon, *Le dernier voyage extraordinaire — Voyage à Terre-Noire* (La lasta eksterordinara vojaĝo — Vojaĝo al Nigra-Tero), kies ĝenron li nomas “literatura rekonstruo”. Fakte, temas pri harmoniiga kunfando de la ekzistanta romankomenco kaj de tio kion la filo Michel Verne poste eldonis sub la patra nomo.

Mirinde ke Jules Verne neniam ĉesas esti ne nur pasiiga legaĵo, sed eĉ inspira verkofonto!

István Ertl